

Eduard Ebel,

## Leise rieselt der Schnee

Leise rieselt der Schnee,  
still und starr ruht der See,  
weihnachtlich glänzet der Wald.  
Freue dich, Christkind kommt bald!

In den Herzen ist's warm,  
still schweigt Kummer und Harm,  
Sorge des Lebens verhallt.  
Freue dich, Christkind kommt bald.

Bald ist heilige Nacht,  
Chor der Engel erwacht,  
hört nur, wie lieblich es schallt:  
Freue dich, Christkind kommt bald!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* EDUARD EBEL (*Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905*).

MR-012-3 / Arg-99-198 (2014-04-23 17:57:42)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikipedia.org/wiki/Leise\\_rieselt\\_der\\_Schnee](http://de.wikipedia.org/wiki/Leise_rieselt_der_Schnee).

Eduard Ebel,

## Ŝvebas neĝ' el aer'

*tradukita de Joachim Gießner*

Ŝvebas neĝ' el aer',  
nun ripozas la ter'.  
Mondo en brilblanka vest',  
ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',  
for ĉagreno kaj plor',  
ĉesas de l' viv' la molest',  
ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.  
Kaj el ĉielo la ĥor  
Sonos en dolĉa majest',  
Goju, ja venos kristfest'.

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de* EDUARD EBEL (*Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905*) *en Esperanton de* JOACHIM GIESSNER (*\*1913-12-23 – †2003-11-25*).

MR-012-JG-1 / Arg-99-200 (2012-12-24 16:27:56)

MR-012-JG-1

Eduard Ebel,

## Flustre falas la neĝ' '

*tradukita de Josef Kühnel*

Flustre falas la neĝ'.  
Lag' rigidas laŭ leĝ'.  
Kristfeste brilas arbar'.  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.  
Foras ĉiu dolor'.  
Fuĝas la vivoamar'.  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'  
kaj ĉiela jubil'  
logas laŭ ĉarma fanfar':  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de* EDUARD EBEL (*Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905*) *en Esperanton de* JOSEF KÜHNEL.

MR-012-JK-1 / Arg-99-202 (2010-09-18 19:50:56)

MR-012-JK1

Eduard Ebel,

## Neĝas nun ĉie ĉi

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Neĝas nun ĉie ĉi,  
lagon kovras glaci',  
brilas kristnaske arbar'.  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',  
malaperas dolor',  
venas savant' de l' homar'.  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',  
sankta nokt' estas nun,  
kantas por ni anĝelar':  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de* EDUARD EBEL (*Eduardo Ebelo, \*1839 – †1905*) *en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04*).

Arg-99-199 (2003-12-11 08:30:04)

MR-012-3